

Kataluna Esperantisto



NUMERO 332 (98)
KVINA EPOKO
OKTOBRO-DECEMBRO
2004

Edena Ceret

Nova KEA-aktivisto

*Kursoj en Mataró
kaj Palma*

*Aranĝoj en Manresa
kaj Vilanova*

*Amaskomunikila
sukceso*

*Lingvofestivaloj
en Barcelono
kaj Ĉuvaŝio*

*Nova disko
de Kaj Tiel Plu*

*Llibres
imprescindibles*

Indymedia Barcelona parla esperanto

El passat 27 de novembre el portal d'informació Indymedia Barcelona, amb la col·laboració de l'Associació Catalana d'Esperanto, va començar a utilitzar l'esperanto com a quart idioma, i al mateix nivell, al costat del català, el castellà i l'anglès. Com en estes llengües, els editorials apareixen en esperanto, així com les informacions pròpies del portal.



Indymedia és una gran xarxa gestionada per col·lectius de tot el món i organitzada per llistes de correu i assemblees presencials. El projecte Indymedia va sorgir arran de les protestes contra la reunió de l'Organització Mundial del Comerç a Seattle, l'any 1999. Un any després, es va decidir crear Indymedia Barcelona, que esdevindria el primer centre Indymedia d'Europa. A partir d'ací, Indymedia Barcelona ha crescut fins a convertir-se en el que és ara, un espai lliure, sòlid i col·lectiu que dóna veu a moviments socials, individus i tota mena d'organitzacions.

Des de l'assemblea de Barcelona Indymedia es presenta l'esperanto com una nova opció lingüística. "Amb el seu ús es vol contribuir a fer el món més just, de manera que ningú per raons de naixement o de nivell econòmic tinga més oportunitats d'accedir al domini de les llengües que s'imposen" afirmen. És a dir, el que busca és evitar la discriminació per raons lingüístiques, ja siga de la nostra llengua, el català, o d'altres idiomes minoritaris de tot del món. Totes les llengües i cultures del món mereixen el mateix respecte i llibertat. □



**La kongreso
permesas kunvenigi
la esperantistojn,
ĝui internacilingvan
etoson, kleriĝi
kaj viviĝi
la esperanto-kulturon**

La pasinta trimestro estis plena de novaĵoj, kio klarigas la nekutiman amplekson de la numero. Unualoke, la amaskomunikiloj informis pri esperanto je niveloj ne atingitaj de multaj jaroj, same en televido, kiel en radio kaj en la paperaj kaj retaj gazetoj. La kaŭzo estis nia kongreso kaj la centjariĝo de la esperanto-movado en nia lando, sed ankaŭ bona gazetara kampanjo pelita de nova laborgrupo pri informado kreita komence de septembro. Alia ĉefa zorgo de ĉi tiu grupo estis la lanĉo de esperanto-eldono de Indymedia Barcelono, kion ĝi elstare sukcesis fine de novembro.

Krome, la kongreso brilis laŭ la kutime alta nivelo. Ĝi permesas kunvenigi la esperantistojn, ĝui internacilingvan etoson, kleriĝi per interesaj prelegoj kaj viviĝi la esperanto-kulturon per elstaraj artaj vesperoj. Bedaŭrinde, nia asocio ankoraŭ ne atingis sufiĉajn organizan kaj financan kapablojn por ĉiujare organizi unu... Sed solvi tion parte helpas Ferriol Macip, la nova salajrata aktivulo de KEA.

Laste, sed ne balaste, indas ĝoji ne nur pri la multaj pozitivaj novaĵoj, sed ankaŭ pri la rimarkinda nivelo de kunlaboraĵoj. Kelkajn la legantoj ne rekte rimarkos, ĉar temas pri multaj mallongaj informoj pri esperanto kaj pri lingvoj, kiuj tre riĉigas kaj diversigas la revuon, kaj kiuj abunde alvenis el pluraj kunlaborantoj (notu la ŝveliĝon de la nombro ĉi-sube). Krome, ni povas ĝui interesajn artikolojn de Joan Inglada (du) kaj Pedro Martín, aldona al la jam tradiciaj rubrikaj de Darío Rodríguez kaj Ramon Perera. Krome ĉi-numere, ni bonvenigas novan konkurson de nia kara eksredaktoro Joan-Ramon Guñón, kiu eble helpos senpezigi la troseriozecon de la bulteno.

Hektor Alos i Font

Rubriko por komencantoj kaj progresantoj

Por igi la revuon pli alloga kaj interesa por ili (lastatempe, feliĉe konsiderinde plimultiĝintaj), ni ŝatus enkonduki novan rubrikon por ili ekde la unua numero de la venonta jaro (redaktofino: meze de februaro). Temus pri tekstoj (principe, po duonpaĝaj) laŭ la niveloj tre facila (500-radika) kaj facila (1000-radika) de *Kontakto*. Se iu pretas kunlabori, tiu bonvolu sin turni al Hektor Alos.

En ĉi tiu numero kunlaboris: Bàrbara Suau, Christian Pinard, Darío Rodríguez, Ferran Marín, Ferriol Macip, Francesc Poblet, Francesc Verdugo, Gerard Escuer, Guillem Portell, Joan Inglada, Joan Ramon Guñón, Karles Berga, Libert Puig, Pedro Martín, Ramon Perera, Sylvie Roques, Xavier Murcia.

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Ret-Info, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto-ct.org
Ret-paĝo: www.esperanto-ct.org
Ret-listo: nia_listo@esperanto-ct.org

Kotizoj por la jaro 2004: Individua Abonanta Membro 35 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 75 eŭroj; Individua Dumviva Membro 750 eŭroj; Kolektiva Membro 75 eŭroj; Juna Membro 23 eŭroj.
Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell,

Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053
UEA-konto: keae-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Libert Puig; komitatanoj: Arnau Massanes, Mateu Vic.

Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Òscar Puig, Luz Vázquez.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Guillem Portell; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Imprès a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Edena Ceret

Joan Inglada

Ĉu vi ne ĉeestis Jubilean Katalunan Kongreson de Esperanto? Bedaŭrinde! Tion ne forgesu estonte!

Kia ĝojo trovi tiom da geamikoj en esperanta medio en Ceret! Plenplena da homoj surstrate ĉar, meze de aŭ kune kun la ĉiusemajna surstrata merkato, okazis ĉiujara florfiroj memore al forpasintoj. Ni kvar: mia edzino, novlernantino, esperantistino loĝanta ĉe nia urbo kaj mi mem, alvenis propraveturile kaj devis parki ĝin for de la centro de la vilaĝo kvankam nia hotelo kuŝis precize en la centro, tute apude de la kongresejo. Do ni, ŝarĝitaj per valizoj, bonŝance nur semajnfinaĵoj kaj pro tio malmulte pezaj, devis trapasi grandan tumultan homamason, kiuj trankvile vagadis tra la bazaro.

La organizanta estraro alvenis per aŭtobuso elirinta el Barcelono kaj trapasinta Sabadell, sed subita telefonvoko sciigis nin pri alvena malfruo pro trafikoŝtopiĝo.

Survoje al la hotelo ni renkontis gesamideanojn promenantajn sub la brila suno de tiu bela tago. Same okazis en la hotela akceptado kaj en la lifto.

Tuj poste ni iris al la urbodomo, kie devis okazi la urbestra akceptado. Tie ni renkontis gesamideanojn el la plej apudaj katalunaj loĝlokoj kaj okcitanojn kaj francojn. Ni salutis la plej konatajn unue kaj la aliajn iom post iom. Oni informis, ke la urbestro tre afable diris, ke ni ne zorgu pro la prokrasto, ĉar tiel li povos ankoraŭ labori iomete pli. Poste nova telefonvoko sciigis nin pri la tiel atendata alveno. Kelkaj iris helpi la sudalvenintojn kaj la aliaj restis ĉe la urbodomo atendante la eventon. Fine okazis la inaŭguro de la kongreso, dum kiu parolis la urbestro, la KEA-prezidanto kaj la prezidanto de la Kataluna Kultur-Centro de Vallespir. La urbestro regalis nin per lunĉeto kaj tuje ni ekiris al la kongresejo kaj tiuj lastaj alvenintoj al hoteloj kaj junulara restadejo. La tagmanĝo estis ĥaose solvita pro la ĝenerala malfruo sed je la tria posttagmeze pli-malpli komenciĝis la kongreso, do akceptado kaj




disdono de dokumentoj –kun pico sur la akcepteja tablo–, la libroservo, la budo de Vinilkosmo kaj la unua libro prezentado katalunlingve de la dulingva libro –katalun-esperanta– pri la komenco de la esperanta movado en Katalunio. Interretaj rimedoj, eldonejo Limaco, rusa profesia redaktoro de esperanto-magazinoj kaj libro-eldonejo, ateliero por esperanto-instruantoj kaj tre belega muzika vespero, estis la sabataj programeroj. Dumnokte pluvis senĉese sed milde. Dimanĉe okazis prezentado de katalunlingva libro, kiu krompritraktas esperanton, prelego pri didaktiko de esperanta gramatiko, posttagmeze, vizito al la Modern-Arta Muzeo kun detala klarigado, en la franca bedaŭrinde, sed kun tre bona traduko al esperanto. Tie en la kongresejo, ateliero pri librobindado, prelego pri la komencaĵoj de esperanto en Ruslando, dua parto de la ateliero por esperanto-instruantoj, prelego en la kataluna pri la situacio de la kataluna lingvo en norda Katalunio kaj postvespermanĝe reprezentado de la teatraĵo “Familia etoso”. Lunde matene ni alvenas al la fino per la prezentado de du pliaj katalunlingvaj libroj pritraktantaj esperanton kaj la prelego pri Anton Ĉeĥov en esperanto. Tuj poste ni iris al restoracio por kune bankedi.



Nun miaj impresoj: la kongreso estis kiel feliĉa insulo meze de oceana evolua mondo. Mi rezignas menci nomojn, ĉar mi emas al civitanismo kaj tie ĉiuj homoj estis samgravaj. Mi havis la plezuron paroli kun multaj esperantistoj, t.e. instruistoj, kantistoj, verkistoj, komercistoj, butikistoj, studentoj, emeritoj, eldonistoj, oficistoj, komputikistoj, scenejartistoj, universitataj profesoroj, ĉiuspecaj aktivistoj, esperanto-instruistoj, apotekistoj, dom-familizorgantoj,

tradukistoj, ktp. Mi partoprenis interesegajn debatojn kaj fine, en la bankedo, ni estis ses homoj, inter ili la kunreĝisorino de la teatraĵo. Ni komentis la teatraĵon kaj kion teatraĵi signifas en Esperantio kaj en la ne-esperanta vivo; ni pritraktis elprononcadon, ritmon, voĉlaŭtecon, komedi-apartaĵojn kaj mil plurajn aliajn aspektojn. Plezurege, preskaŭ la edeno, al kio tre proksimas Ceret. Eble pro tio multaj artistoj elektis ĝin de antaŭlonge. □



Grup del Llibre – La Klubo de Legantoj de la Katalunaj Landoj donacis al ĉiuj partoprenantoj de la kongreso ekzempleron de sia revuo Lletres. Krome Lletres informos pri la kongreso en sia venonta numero. Dezirantoj povis partopreni lotadon por libropremio proponita de Grup del Llibre. Ĝin gajnis Mercè Porta, al kiu Francesc Poblet, redakciano de Lletres, enmanigis la librojn.

reklamado kaj la situo de la forumejo en la pleja centro de Barcelono, la forumo altiris tre malmultajn scivolemulojn. En tiu kadro Hektor Alos prezentis esperanton antaŭ kvinpersona publiko. Interesa estis la partopreno de la nuntempe sola idisto en Barcelono, kiu ankaŭ prelegis en la forumo.

Nova TTT-ejo de “Miquel Vilagran”

La esperanto-departemento de la asocio Amikoj de Unesco de Barcelono inaŭguris novan retpaĝaron. Temas pri mallongaj sed utilaj informoj pri la grupaj aktivajoj. La TTT-estro estas Mon Cardona, kiu zorgas pri diversaj aliaj retejoj, ĉefe de popol-muzikaj kaj -dancaj grupoj.

Nova KEA-logotipo

En la kongresaj eldonaĵoj ekfunkciis la nova logotipo de KEA. Ĝin kreis Felip Artero kaj Ferriol Macip, surbaze de la antaŭa, fasonita de Salvador Cruz kaj Òscar Puig antaŭ preskaŭ 25 jaroj. Kiel ĉe Kataluna Esperantisto komence de la pasinta jaro, per tia renovigo la asocio celas modernigi sian eksteran bildon.

Kurso por instruistoj en Palma


De januaro ĝis marto okazos en Palma de Mallorca kurso por instruistoj, organizita de la sindikato STEI-i. La kurso estos entute dudek-hora kun du-horaj sesioj foje en la semajno. Oni antaŭvidas, ke preskaŭ ĉiuj majorkaj aktivuloj instruos en ĝi: Assumpta Mascaró, Bärbara Suau, David Martínez, Elisabet Abeyà, Mateu Vic, Tomeu Mulet, kaj Xavier Margais. La temojn oni dividos inter la instruistoj kaj kombinos ilin en

En Sabadell pri Dostojevskij

Du tagojn antaŭ la kongreso, la 28an de oktobro, Aleksander Korĵenkov prelegis en Centro de Esperanto Sabadell pri “Dostojevskij en esperanto”. Li prezentis kelkajn esencajn faktojn pri la personeco kaj la stilo de la aŭtoro. Dudeko da personoj ĝuis liajn grandajn sciojn de elstara tradukinto i.a. de Dostojevskij.

Fòrum de les llengües

De la 27a de septembro ĝis la 3a de oktobro estis organizita por la unua fojo en Barcelono lingvoforumo. En ĝi prezentiĝis sinsekve pli ol 70 lingvoj en unu-horaj sesioj. Malgraŭ la senpageco de la aranĝo, ĝia intereso kaj la diverseco de la lingvoj prezentitaj, ĝia bona



Aleksander Korĵenkov

ĉiu sesio: leksiko, gramatiko, historio de esperanto, esperanto en la reto, ktp. Oni klopodos, ke la kurso estu luda, kaj ke homoj ekparolu esperanton ekde la unua tago.

bs / red

Forta interesigo en Mataró

La 6an de novembro, okazis en Mataró la prezento de la esperanto-kurso, kiun kelkaj anoj de la sindikato CNT kaj KEA kunorganizis. La kunsido, en kiu partoprenis Xavier Rodon kaj Josep Maria Milla, celis montri al la interesitoj la lingvon, la esperantan movadon kaj la kurson mem. La lecionoj komenciĝis la 18an de novembro kun 26 lernantoj gvidite de Josep Maria Milla kaj Ferriol Macip.

[Aliaj ĉeestaj kursoj komenciĝis en Barcelono (Amikoj de Unesko: Neus Moly kaj Ramon Perera – tri paralelaj grupoj, du diversaj niveloj), Sabadell (Llibert Puig – du niveloj), Olot (Lluís Batlle – komencantoj) kaj Prada de Conflent (Christian Pinard – miksitaj grupo). Krome, dekkelkaj lernantoj sekvas la diversajn retkursojn.]

fv / red

Premio Dalmau ne aljuĝita

Denove, kiel okazis en la dua okazigo de la premio antaŭ du jaroj, ne estis aljuĝita la Premio Delfi Dalmau pri ekolingvistaj gazet-artikoloj en la kataluna aŭ esperanto pro manko de partoprenantoj. La organizantoj estas iom surprizitaj, ĉar la klopodoj diskonigi ĝin, ĉefe en katalunaj medioj, estis sufiĉe grandaj, kaj informoj pri ĝi aperis en diversaj lokoj, inkluzive de la ĵurnaloj *Avui* kaj *El País*. La organiza komisiono studas ŝanĝi la formaton de la konkurso, kiu povus premii jam publikigitajn artikolojn aŭ, eventuale, forlasante la premiecon, libroforme eldoni kolekton da elstaraj ekolingvistaj artikoloj ĉiun duan jaron plu omaĝe al nia granda aktivulo kaj pionira socilingvisto.

BTV ne elsendos en esperanto

KEA prezentis proponon al la estraro de BTV, la televidkanalo de la barcelona urba



Kursanoj el Mataró

konsilantaro, por enkonduki esperanton en siaj plurlingvaj novaĵoj, okaze de la baldaŭa aldono de novaj lingvoj. Kvankam la proponon subtenis la respondeculo de la fako, ĝi estis fine malakceptita pro buĝetaj kialoj. Tamen la okcitanlingvaj novaĵoj, la plej spektataj el la tuta aro pro sia komprenebleco, kaj kiujn kungvidas Ferriol Macip, jam informis ĉi-jare pri ses diversaj esperantaĵoj.

Amaskomunikila sukceso

La kongreso kaj la centjariĝo de la esperanto-movado en nia lando sukcesis vekti la intereson de rimarkinde multaj amaskomunikiloj.

La unua komencis la revuo *Catalunya* de la sindikato CGT, kiu en sia septembra numero dediĉis al la esperanto-movado tutpaĝan artikolon de Francesc Poblet. *Diari d'Andorra* prezentis en sia tuta lasta paĝo de la 14a de oktobro intervjuon al Gerard Escuer, kaj dek tagojn poste *L'Indépendant* prezentis kvin-kolumne la baldaŭ okazontan kongreson en Ceret. En la tago de la kongres-inaŭguro, la 30an de oktobro, la ĵurnalo *Avui* publikigis duonpaĝan artikolon de Francesc Poblet pri la historio de la esperanto-movado en Katalunio. Samtage, *Segre* aperigis duonpaĝon pri la esperanto-kongreso kun granda foto de nia prezidanto, Josep Franquesa. En la antaŭa tago *Diari de*

**Ĉu denove
katalunistoj kaj
maldekstruloj fariĝos
la motoroj de la
movado?**

**Senfine pli malfacilaj
celoj estas
la malaperigo
de militoj, la elradikigo
de malsato, la ĉeso
de la mortoj
pro kuraceblaj
malsanoj, la fino
de ĉiaj diskriminacioj
pro sekso, raso,
deveno, opinio, seksa
orientiĝo kaj la egaligo
de la ŝancoj en mondo
pli kaj pli dividata
inter riĉeguloj
kaj senhavuloj...**

La rezultoj de la informada kampanjo estas tre kontentigaj. Dupaĝa artikolo en *El Triangle*, tutpaĝa en *Presència*, trikvaron-paĝa en *El País*, duon-paĝa en *Avui*, du minutoj kaj duono en la nacia televido kaj ses kaj duono en la ĉefa nacia radiostacio estas nekontesteblaj sukcesoj, same kiel la rimarkinde multaj artikoloj kaj intervjuoj i.a. en *L'Indépendant*, *Segre*, *La Mañana*, *Diari d'Andorra*, *Diari de Vilanova*, *Catalunya Cultura*, *Ràdio Nacional d'Andorra*, *Ràdio Arrels*, *Ràdio Sabadell*, *Ràdio Ribes*, *BTV*, *El 9 TV*, *Vilaweb*, *Les Verds de Catalogne*, *CGT* kaj *Racó Català*. Krome, estas anoncigitaj du-tri pliaj gravaj artikoloj en decembro, espereble aperontaj

Indas rimarki la sufiĉe multajn intervjuojn: Christian Pinard, Francesc Poblet, Gerard Escuer, Guillem Portell, Hèctor Alòs, Joan Inglada, Joan Pere Sunyer, Josep Franquesa kaj Llibert Puig. Tio respegulas fortan grupan laboron de eĉ pli multaj homoj, kaj tio estas bonega novaĵo por nia asocio. Kompreneble, evento kiel la centjariĝo de esperanto ne okazas ĉiujare, sed estas gratulinde, ke ni sukcesis ekspluati ĝin. Tio certe spertigos la junan inform-teamon de la asocio kaj, espereble, ankaŭ glatigos la aperigon de informoj pri esperanto en la estonteco.

Samtempe indas analizi la aperintajn novaĵojn: la tri plej legataj ĵurnaloj, *El Periódico*, *La Vanguardia* kaj *El País*, nenion aperigis pri la kongreso, kvankam la informkampanjo verŝajne helpis al aperigo de longa artikolo pri la lingvo en la tria. La kongreso mem ne estis novaĵo, krom en regionaj ĵurnaloj kiel *L'Indépendant* kaj, tre flanke, en *La semaine du Roussillon* kaj *El Punt*. Opini-artikoloj subskribitaj aperis en *Avui* (Francesc Poblet) kaj *Diari de Vilanova* (Joan Inglada)... sed ne ĉiuj sukcesis. La kampanjo grandparte utilis al aperigo de intervjuoj al lokaj aktivuloj en regionaj informiloj (Gerard Escuer en *Diari d'Andorra* kaj *Radio Nacional d'Andorra*, Josep Franquesa en *Segre* kaj *La Mañana*, Llibert Puig en *Ràdio Sabadell*, Guillem Portell en *El 9 TV*, Joan Inglada en *Ràdio Ribes* kaj Christian Pinard kaj Joan Pere Sunyer en *Ràdio Arrels*). Fakte iom tiajn artikolojn ofte celas la Brusela Komunikad-Centro kaj evidentiĝis, ke tia politiko povas esti trafa, almenaŭ se ĉirkaŭita de pli detalaj informoj pri esperanto.

Aliflanke konstatindas, ke ĉefan reeĥon ni ial sukcesas en sendependismaj gazetoj (*Vilaweb*, *Presència*, *El Punt*, *El Triangle*), dum ĝis nun venis neniu reago de *El Periódico* aŭ *La Vanguardia*. Al nia asocio venis ankaŭ rekta inform-peto pri esperanto el Esquerra Republicana de Catalunya, kies revuo laŭlonge de la lasta jaro fakte jam publikigis la biografion de du elstaraj esperantistoj. Samtempe, ankaŭ la revuo de CGT aperigis artikolon pri esperanto kaj ĝia TTT-ejo jam dufoje informis pri ĝi (aŭguste, okaze de la Universala Kongreso, kaj oktobre pro la kataluna). CNT-anoj organizas en Mataró la plej multnombrajn esperanto-kurson ĉe ni en minimume jardeko, kaj aliaj samsindikatoj el Granollers interesiĝas pri la okazigo de alia. Ankaŭ la sukceso en Indymedia povas enkalkuliĝi al simpatio en liberecanaj rondoj. Ĉu denove katalunistoj kaj maldekstruloj fariĝos la motoroj de la movado, kiel antaŭmilite?

Laste sed ne balaste, necesas ankoraŭ per niaj tutaj fortoj kontraŭi antaŭjuĝojn: kelkaj el la informoj klare tralikas enradikiĝintajn antaŭjuĝojn pri esperanto, kvankam eble ne kontraŭ ĝi. La strebo de la TV3-teamo prezenti ĝin kvazaŭ muzeaĵon estis antaŭdecidita, kaj ĉiaj streboj de Francesc Poblet ne sukcesis ŝanĝi ĝin. Simile devis sturmi Gerard Escuer kun sia intervjuo en *Diari d'Andorra*, kies fiksideo estis, ke lingva egalrajteco estas nerealigebla utopio. Tamen senfine pli malfacilaj celoj, kiel la malaperigo de militoj, la elradikigo de malsato, la ĉeso de la mortoj pro kuraceblaj malsanoj, la fino de ĉiaj diskriminacioj pro sekso, raso, deveno, opinio, seksa orientiĝo kaj la egaligo de la ŝancoj en mondo pli kaj pli dividata inter riĉeguloj kaj senhavuloj... ĉio ĉi ne estas ironiindaj nerealigeblaj utopioj.

Hektor Alos i Font

Vilanova publikigis longan opini-artikolon de nia aktivulo Joan Inglada kun la pensiga titolo “Morirem d’inanició cultural?” (Ĉu ni mortos pro kultura inanicio?). Samtage, *Presència*, la dua plej legata semajna gazeto en la kataluna, aperigis tutan paĝon pri esperanto en Interreto en sia ret-rubriko. Alia grava semajna gazeto, *El Triangle*, prezentis esperanton du-paĝe la 8an de novembro, kaj samtage *L’Indépendant* faris mirinde precizan kaj ĝustan recenzon pri la kongreso en duonpaĝo, anoncitan frontpaĝe. Pli mallonge pri la kongreso informis *La Semaine du Roussillon*, la 28an de oktobro, kaj *El Punt*, la 30an. En la antaŭa tago, *La Mañana* enhavis tutpaĝan intervjuon pri esperanto al Josep Franquesa kun granda foto. Krome, la vaste legata *El País*, en sia katalunia kajero, aperigis tri-kvaron-paĝan artikolon pri la kataluna esperanto-movado la 19an de novembro: por la dua fojo, ambaŭ ĉi-jare, esperanto okupas elstaran lokon en tiu ĵurnalo.

Radio ne postrestis. *Ràdio Nacional d’Andorra* intervjuis Gerard Escuer lundon la 18an de oktobro je la 16a horo dum 30 minutoj. *Ràdio Arrels* vendrede la 22an de oktobro je la 18a intervjuis Christian Pinard kaj Joan Pere Sunyer dum 45 minutoj. Kiel en la antaŭa okazo, la dissendo estis ripetita en alia tago. *Catalunya Ràdio* intervjuis Llibert Puig dimanĉon la 24an iom antaŭ la 11a dum ses minutoj kaj duono, kaj ankaŭ *Ràdio Sabadell* intervjuis lin vendrede la 29an matene, same kiel –tre mallonge– ankaŭ Hector Alòs rekte dum la kongresa inaŭguro, la 30an de oktobro. Siaflanke, *Ràdio Ribes* interparolis kun Joan Inglada ĵaŭdon la 4an de novembro, posttagmeze, dum 15 minutoj, kaj *Catalunya Cultura* same faris kun Llibert Puig lundon la 9an de novembro, je la 9a kaj duono, dum 9 minutoj.

Televideo ne restis indiferenta. TV3 aperigis en sia rubriko “L’apunt final” (La lasta noto) de la tagmezaj novaĵoj dum du minutoj kaj duono (kun antaŭa anonco antaŭ la reklampaŭzo) iom historian skizon pri la esperanto-movado. Enkondukis Francesc Poblet kaj la prezento ĉefe okupiĝis pri la esperanto-muzeo en Sant Pau d’Ordal. Ĉe la fino, esperanto-lernantoj antaŭ komputiloj iom hodiaŭigis la etoson. La loka televideo El 9 TV, el Vic, intervjuis Guillem Portell vendrede posttagmeze dum tri minutoj, kaj poste reŝendis ĝin dufoje en la sekva

sabato. *Infòc*, la okcitanlingvaj novaĵoj de BTV elsendataj sabate je la 11:05 kaj denove dimanĉe matene, informis pri la kataluna kongreso la 13an de novembro dum pli ol du minutoj, kun speciala atento pri la katalun-okcitana kunlaboro. La sekvan semajnon *Infòc*, same dum pli ol du minutoj, prezentis la lastan diskon de Kaj Tiel Plu.

Same ret-ĵurnaloj prezentis la kongreson. *e-noticies.com* jam en la 7a de oktobro aperigis mallongan anoncon pri la okazigo de la kongreso. Pli detale informis la retejo de *Les Verds de Catalogne* la 11an, *Indymedia Barcelono* la 27an kaj la 30an kaj la du retejoj de la sindikato CGT la 31an. *Vilaweb* aperigis novaĵon en la tago de la inaŭguro, la 30an de oktobro, dum *Racó Català* tion faris la 8an de novembro. Indas reliefigi ankaŭ, ke la 10an *La Malla* elektis nian retlokon www.esperanto-ct.org kiel la TTT-ejon de la tago: por la tria fojo esperantista retloko estis elektita.

La lavango estas tiel elstara, ke apud ĝi paliĝas la mallongaj aludoj kaj citaĵoj pri esperanto, kiuj kutime legeblas en nia gazetaro. Por kompleteco, ni informas ankaŭ pri ili.

Infòc informis la 18an de septembro pri la asocio-foiro okazinta la 11an de septembro kun ▶



Nova KEA-aktivisto

Ekde la 1an de decembro, Ferriol Macip fariĝis la nova KEA-dungito. Li fakte tute ne bezonas prezenton, ĉar de pli ol 15 jaroj li aktivas en KEJ kaj KEA. Ni menciuj nur, ke li estis kunredaktoro de la KEJ-revuo *Frequències. Revista de llengües i pobles*, kaj en diversaj periodoj,

kiel en la nuna, kompostis *Katalunan Esperantiston*. Li ankaŭ *kulpas* pri multegaj broŝuroj, flugfolioj, aliĝiloj k.a. Krome, li violonludas en la ensemblo Kaj Tiel Plu. Ekster la asocio li laboras memstare kiel tradukisto kaj kompostisto kaj ĵurnalistas en la okcitanlingvaj novaĵoj de BTV.

Aliflanke, el asocia vidpunkto, ni ŝanĝis la dungosistemon, celante, ke la kontrakta rilato pli longos ol en la du antaŭaj okazoj. Fakte, la bonega laboro de Josep Maria Milla kaj Karles Berga glatigos tiun de Farri, kaj decide kontribuis en la ĉi-jaraj sukcesoj. Sed estas multege ankoraŭ por fari (por Farri... kaj por ni ĉiuj).

speciala mencio pri la KEA-budo. Samtage *Avui* menciis la uzadon de esperanto en la teatraĵo “EEUropa” de Teatre de Guerrilla. *Vilaweb Castelló* menciis prelegon pri esperanto la 28an de septembro kaj alian en la 13a de oktobro.

La 30an septembro en *Avui* la enigmisto Marius Serra aludis al nia lingvo en artikolo pri la ŝerca mikslingvo Europanto. Iom malpli fama, la ĵurnalisto kaj kunfondinto de *El Punt*, Pius Pujades, kiu plurfoje esprimis sian simpatian por esperanto, menciis ĝin en akre ironia artikolo la 11an de oktobro. La tono estis tiel morda, ke ĝi erare kredigis plurajn homojn pri kontraŭstaro al la internacia lingvo, sed diskuto en nia retlisto montris la malon. Kelkajn tagojn antaŭe, la 3an de oktobro, la sama ĵurnalo mallonge informis pri KAE-aranĝo en Salou.

La 10an de oktobro, en artikoloj pri gazetara konferenco de la hungara verkisto Péter Esterházi dum la Libro-Foiro de Frankfurto, *El Periódico* kaj *Avui* menciis demandon, kiun oni starigis al li pri esperanto. *El Periódico* esprimis miron pri la okazaĵo kaj laŭdire same surprizita estis Esterházi.

Ciberp@ís, la semajna suplemento de *El País* pri Interreto, menciis esperanton en artikolo pri Vikipedio la 14an de oktobro, kio vekis reagon de esperantista leganto publikigitan en la sekva semajno. La 2an de oktobro aperis letero de leganto en *Avui* pri *Diccionari de mila mots*, la unua difin-vortaro en la okcitana, informante, ke ĝi enhavas ankaŭ tradukojn de la kapvortoj al esperanto. Ankaŭ *Segre* publikigis poresperantan leteron de leganto la 27an de oktobro, same kiel *El Punt* la 17an de novembro. En ĉi tiu okazo temis pri ĝustigo al artikolo aperinta la 3an kun la titolo “La torre de Babel artificial” (La artefarita Babel-turo), kaj en kiu esperanto estis prezentita kvazaŭ unu plia el miriado da planlingvoj. La repliko, de Hèctor Alòs, substrekis, ke ĝi larĝege superas ĉiujn aliajn kune pro sia uzado, kaj ke sole ĝi fariĝis funkcia lingvo anstataŭ nur propono. La sama *El Punt* menciis esperanton la 20an de novembro en artikolo pri historio.

Laste indas komenti la mension aperintan en *El Periódico* la 1an de novembro pri la esperantisteco de la milionulo George Soros en artikolo titolita “Soros kontraŭ Bush”.

Estas rimarkinde, ke tiu flanka detalo sufiĉe famiĝis en Usono dum ĝi, laŭ nia scio, estis menciita nur ĉi-okaze ĉe ni. Sendube tio ŝuldiĝas al la anglalingva traduko de la libro *Maskerado ĉirkaŭ la morto de lia patro*, Teodoro Švarc, farita antaŭ kelkaj jaroj de Humphrey Tonkin.

Manresa festos la centjariĝon de esperanto

Okaze de la centjariĝo de la esperanto-klubo en Manresa, unu el la unuaj tri lokaj grupoj fonditaj en la jaro 1904, diversaj aranĝoj estos organizitaj en la urbo. La 14an de decembro prelego de Llibert Puig inaŭguros la ekspozicion “100 jaroj da esperanto en Manresa” en la kvartala asocio Cal Gravat. Ĝi funkcios ĝis la 23a de decembro kaj denove de la 10a ĝis la 18a de januaro, labortage de la 5a ĝis la 7a. En ankoraŭ ne fiksita dato en januaro oni planas okazigi ankaŭ koncerton de KTP. Krome, la 17an de februaro Manel Vinyals kaj Joaquim Marcoval prezentos la libron “Amb l’esperanto a la motxilla. La volta al món en 79 dies” en la biblioteko El Casino je la oka kaj duono vespere. La tuto spronis la komencon de esperanto-kurso en la 14a de januaro, la unua de antaŭ longaj jaroj. Ĝin gvidos Pere Palà.

fs / red

Esperantista januaro en Vilanova

La biblioteko Joan Oliva de Vilanova i la Geltrú organizos diversajn aranĝojn en rilato al esperanto dum la venonta jaro. La 4an estos inaŭgurita ekspozicio en kun la titolo “Esperanto: libroj kaj muziko”. Sabaton la 12an, je la tagmezo, Éric Collignon, kun la helpo de Joachim Boehmeke, gvidos “familian atelieron”, en kiu estos legataj fabeloj kaj fabloj en esperanto kaj la kataluna. Ferme, vendredon la 21an, je la 7a kaj duono vespere, okazos la plej formala programero, dum kiu Hèctor Alòs enkonduke prezentos esperanton, Francesc Poblet parolos pri sia libro “La komenca esperanto-movado en Katalunio” kaj Joan Inglada resumos la esperanto-historion de Vilanova.

ji / red

Nova disko KTP

Kaj Tiel Plu lanĉis sian duan diskon “Plaĉas al mi”, eldonitan de la tuluza Vinilkosmo. Same kiel en la unua disko, “Sojle de la klara temp”, la ensemblo prezentas kanzonojn ĉefe de la okcitan-kataluna tradicio: ni trovas ĉi tie tiel famajn verkojn kiel “La karcer’ de Lleida” aŭ “Ni kunvenas”, el la Ruĝa Libro el Montserrat. Sed, kvankam mezepoka kaj popola tradicioj superregas, inkluzive de verko de la trobadoro Berenguer de Palou, la ensemblo elektis ankaŭ nuntempajn kanzonojn de Ramon Muntaner kaj Nadau. La disko finiĝas, kvazaŭ emblemo de la grupo, per kanto de la hispana milito, kiel en la unua disko. Ĉiuj tekstoj estas en esperanto – nur la du okcitanaj dancoj instrumentaj restas senvortaj.

La disko montras la maturiĝon de Kaj Tiel Plu kaj estas senrezerve rekomendinda al ĉiuj ŝatantoj de popola muziko.

Kaj Tiel Plu en Plaça del Rei

La ensemblo Kaj Tiel Plu ludis la 12an de novembro en la tradiciaj danckoncertoj de Plaça del Rei de Barcelono. Tiuj subĉielaj koncertoj en la kerno de la Gotika Kvartalo komenciĝis neregule meze de la 1970aj jaroj, kaj iom post iom fariĝis ĉiusemajna kunvenejo por popolmuzikaj dancemuloj. En ĝi Kaj Tiel Plu prezentis siajn novajn kantojn el la ĵus aperinta dua disko “Plaĉas al mi”, enkondukante laŭlonge de la koncerto pli kaj pli danceblajn pecojn, plurajn publike luditajn de ili por la unua fojo. La publiko ĝuis la aranĝon ĝis la unua nokte. Kiel kutime en siaj eksteresperantiaj koncertoj, Kaj Tiel Plu kantis ĉefe nacilingve, en la kataluna kaj la okcitana, sed uzis ankaŭ esperanton, kaj klarigis la kialon de ĝia uzado. En budo bone disvendiĝis, krom la diskoj de la grupo, ankaŭ aliaj produktaĵoj de Vinilkosmo, same kiel diversaj esperanto-materialoj.

Sendependa albumo

Roger Borges, brazila esperanto-muzikproduktisto loĝanta en Barcelono kaj internacia DJ (Usono, Svedio, Londono, Ushuaia...) aperigis sian sendependan albumon en la interreto. En la retejo troviĝas elŝuteblaj kanzonoj en MP3-formato, kaj



ĉiuj kantotekstoj. I.a. oni povas aŭskulti originalajn versiojn de “La Luna Promenado” (trip-hop) kaj “La Turo de Karol” (teĥno), registritaj por la Elektronika Kompilo de Vinilkosmo. En la sama paĝo troviĝas la remiksaĵoj “Papago (haŭs-miks’), de Ĵomart & Nataŝa, “Sentiĝas Am”, de Depeche Mode, kaj “Je Ne T’Aime Plus” (drum’n’bas-miks’) de Manu Chao. Vizitu: www.rogerborges.com.

(El Tejo-Aktuale)

Okcitana Festivalo 2004

Dum oktobro, por la kvina fojo, okazis en Tuluzo la Okcitana Festivalo, organizita de la Instituto pri Okcitanaj Studoj de Garona Nauta (IEO 31). La programo estis ege riĉa kun pli ol 400 artistoj en 50 aranĝoj. La temo estis “la orientoj de Okcitanio”, sed ankaŭ Frederic Mistral estis honorita okaze de la centjariĝo de sia Nobela Premio, kiun li atingis pro sia verko en la okcitana “Mirelha”.

La diversaj kulturoj cirkaŭ Mediteraneo estis elvokitaj laŭ diversaj artoj: muzikoj, teatraĵoj, poezioj, filmoj, literaturoj, prelegoj kaj kantoj. Evidente, la kataluna kulturo ankaŭ ĉeestis per la koncertoj de Lidia Pujol, Gandegang kaj Maria Del Mar Bonet.

Du esperantistoj, aktivuloj en IEO 31, JoMo kaj mi mem, helpis la organizadon de tiu festivalo. Laŭ mi, tiu ĉeesto de homoj samtempe aktivaj por esperanto kaj



la okcitana estas fruktedona por esperanto. Unue, tio permesis montri al ankoraŭ hezitantaj, ke esperanto celas ankaŭ protekti la diversajn kulturojn kaj lingvojn, proponante pontan lingvon, kaj ke la esperantistoj ankaŭ estas malfermitaj al aliaj lingvoj. Due, tio ankaŭ havis la avantaĝon montri, ke Esperanto estas vigla movado en la mondo ĉar, dum tiu monato, JoMo devis forlasi kelkan tempon la festivalon por iri koncerti en Krimeo en esperanta aranĝo kaj mi mem foriris tri tagojn antaŭ la fino por partopreni la Katalunan Kongreson.

Sylvie Roques

Lingvofestivalo en Ĉuvaŝio

Hektor Alos partoprenis en oktobro la 9an Lingvan Festivalon en Ŝupaŝkaro, ĉefurbo de Ĉuvaŝio, organizitan de la aktivega loka esperanto-centro. La aranĝo daŭris du tagojn, dum kiuj prezentiĝis sesdeko da lingvoj, kun la partopreno de ĉ. 600 homoj. En tiu kadro li prezentis la lingvojn katalunan, okcitanan kaj bulgaran – en esperanto kun traduko al la rusa.

Antaŭ la festivalo estis organizitaj mirinde tre diversaj aktivaĵoj, foje pluraj samtempe en diversaj partoj de la urbo, inkluzive de diversaj antaŭprezentoj de la festivalo en lernejoj kaj fakultatoj. Laŭlonge de kvin tagoj, en iom streĉa ritmo, li mallonge prezentis la katalunan lingvon kaj kulturo dekfoje al lernejoj kaj studentoj, same kiel la fremdlingvajn novaĵojn de BTV en la fakultato pri

ĵurnalismo. Esperantistoj, krome, aranĝis por li diversajn kunvenojn kun ĉuvaŝistaj aktivuloj kaj universitataj instruistoj, cele al publikigo de artikolo pri la situacio de tiu lingvo. Li krome prezentis prelegon titolitan “Por engaĝita socilingvistiko” en konferenco kunorganizita de esperantistoj pri “funkciado de minoritataj lingvoj en kondiĉoj de tutmondiĝo”. En ĝi estis prelegoj pri la situacio de la oseta, ĉuvaŝa, dagestanaj lingvoj k.a., duono el kiuj faritaj de esperantistoj.

En tiu miriada da diversaj aranĝoj, menciendas la lingvistika konferenco honore al Nikolaj Aŝmarin (1870-1933), la aŭtoro de la monumenta 17-voluma vortaro de la ĉuvaŝa, organizita de la katedro pri ĉuvaŝa lingvo, en kiu la esperantologo Aleksandr Melnikov estis invitita antaŭprezenti sian duan doktoriĝan tezon en la inaŭgura sesio.

Estas mirinde kaj ĝojinde kiel ĉiujare kelkdekoj da esperanto-aktivuloj sukcesas organizi tiun elstaran eventaron en sia urbo, kaj ne nur okupiĝas pri tio, sed ĉi-jare ankaŭ kunorganizis la rusian IJK, venontjare aranĝos OkSEJT, la ĉefan rusian kongreson ktp. Esperanto en Ŝupaŝkaro viglas, junas kaj kreskas...

ha

Kataluna lingvobunteco en Monato

La septembra numero de revuo *Monato* publikigis artikolon de ĝia regula kunlaboranto Hektor Alos pri la lingvobunteco nuntempe ekzistanta en Katalunio. Li redonas la informon, pri taksoj, ke oni nuntempe parolas ĉ. 300 lingvojn en la lando, kaj opinias, ke la subtenado de tiu diverseco donos pli da ŝancoj al la kataluna.

Artikolo en Aŭstralio

Elena Xampenya, mezlerneja instruistino pri la angla en Terrassa, publikigis en la literatura gazeto *Opinión Hispana* el Melburno (Aŭstralio) artikolon pri esperanto. En ĝi substrekas la avantaĝojn, kiujn ĝuas la parolantoj de la dominantaj lingvoj.

Ater Huzangaj, eksprezidanto de la Ĉuvaŝa Nacia Kongreso (maldekstre), intervjuita de Hektor Alos (dorse) kun interpretado de Slavik Ivanov (meze).



Independència alfabètica

La Cort Constitucional russa ha decidit de manera inapel·lable que la llengua tàtara, de la república autònoma del Tatarstan, no sigui escrita en alfabet llatí i, per tant, s'ha de continuar escrivint amb l'alfabet ciríl·lic. El 1999, les autoritats tàtares van anunciar el projecte de passar del ciríl·lic al llatí per escriure la llengua tàtara, idioma turquès. Però existeix una llei federal que imposa l'alfabet ciríl·lic per a totes les llengües de la Federació Russa i autoritza l'ús d'altres alfabetos sols com a segona forma de transcripció i amb l'aprovació prèvia de les autoritats de Moscou. El Consell d'Estat del Tatarstan va dirigir-se a la Cort Constitucional russa per poder dur endavant el seu projecte d'escriure la seva llengua en alfabet llatí, i ara la resposta judicial russa ha estat negativa adduint que la llei no va contra els drets de les minories lingüístiques, sinó que l'alfabet ciríl·lic fa la funció d'harmonitzar culturalment la Federació Russa.

Els tàtars constitueixen la comunitat no eslava més nombrosa de la Federació Russa, i la República del Tatarstan és la que gaudeix d'un nivell més alt d'autogovern. El tàtar té més de 7 milions de parlants. Va ser escrit en caràcters àrabs abans de la revolució soviètica, amb l'alfabet llatí durant els anys 1920 i primers 1930, fins que Stalin va imposar l'ús del ciríl·lic.

Opinió Catalana / red

Una casa de les llengües

“Si us interessa l'art a totes les grans ciutats del món podreu trobar una galeria d'art. Si us interessa la història natural, no us costarà gaire trobar un museu de ciències naturals o visitar un parc zoològic. Si el que més us interessa és la ciència i la tecnologia, segur que, no gaire lluny, teniu un museu de la ciència. Però si us interessa el llenguatge i les llengües del món, ¿on podreu anar?”

Amb aquestes paraules, el prestigiós lingüista gal·lès David Crystal encapçalava el seu article “Necessitem una Casa de les Llengües” en el quadern Catalunya del diari *El País* del 9 d'octubre. Hi recollia una idea que ja havia llançat durant el congrés de Linguapax organitzat a Barcelona el passat mes de maig. I és que, estranyament, encara no hi ha enlloc del món cap museu o centre semblant on el públic pugui conèixer la diversitat del fet lingüístic, la seva importància cabdal en la nostra espècie, i reflexionar sobre la manera com els nens aprenen a parlar, a quina àrea del cervell es troba el llenguatge, quin és l'origen de la parla, com funciona l'aparell fonador, d'on procedeixen els alfabetos, per què canvien les llengües, entre moltíssimes altres qüestions.

Crystal, en el seu article, proposava Barcelona, com a ciutat pionera per bastir aquesta primera Casa de les Llengües.


Els passaports britànics incorporaran el gal·lès

A partir de l'any que ve, a tots els passaports britànics, hi figurarà la llengua gal·lesa, segons l'agència de notícies Eurolang, atenta a les llengües minoritàries d'Europa. Per primera vegada, doncs, el gal·lès constarà en un document oficial d'ús internacional, gràcies als defensors de la llengua gal·lesa que no han parat de pressionar el govern britànic des dels anys vuitanta. En efecte, fa vint anys Y Cyfamodwyr va expedir un passaport en gal·lès, que en alguns casos va permetre als qui el detenien de viatjar pel continent europeu. Més endavant, Cefn va promoure un timbre gal·lès que es podia estampar als passaports britànics. Ara, finalment, el govern gal·lès i el ministeri d'Interior britànic han arribat a un acord perquè els passaports incloguin la llengua gal·lesa, tot i que encara s'ha de determinar l'ús que se'n farà. Alun Pugh, ministre responsable de la llengua gal·lesa, ha manifestat a Eurolang que la mesura

era “un reconeixement clar del País de Gal·les com una nació amb cultura pròpia.”

Vilaweb

Primera pel·lícula comercial en occità



Malaterra s'ha convertit en la primer film de ficció en occità. La pel·lícula se situa als Alps de Provença el setembre de 1916. Félix és un jove que espera el retorn del seu pare de la guerra. L'arribada d'un rodamón al la família ho capgirarà tot. Ens trobem davant d'una pel·lícula en misteri, amb una família pagesa vivint sola a la vora d'un misteriós poblet derruït, Malaterra.

Malaterra és un film de Philippe Carrèse produït per Thierry Afflalou. Va guanyar dos premis al festival de ficció de Sant Trops. Per donar més realisme a la història està quasi íntegrament parlat en provençal, amb subtítols en francès, a la manera de la recent Passió de Crist de Mel Gibson. Només els funcionaris públics i els

gendarmes parlen francès: dona una visió clara de la situació lingüística del país i de l'època.

France 3 va emetre la pel·lícula a tot l'Estat francès el propassat 11 de novembre. El DVD es pot trobar a la majoria de punts de venda de França i també es pot comprar al lloc web www.oneplusone.fr.

Ja s'anuncia una segona pel·lícula en occità, la primera feta per a la pantalla gran. Es tracta de la producció italiana "Luserna" (el nom encara és provisional), que tracta d'un pastor gascò (i de la seva família) traslladat a les valls occitanes del Piemont a causa de la construcció d'una central nuclear. Allà rebrà tot el suport dels habitants del poble mentre que toparà amb els turistes. Si els diumengers són tan italians com els habitants del poble, el pastor gascò i la seva família són molt menys estrangers, tant per llengua, com per cultura com per manera de viure.

Mentrestant, el director de Malaterra ja prepara una pel·lícula en cors.

Ferriol Macip

Le Monde Diplomatique en sard

El setembre va aparèixer l'edició en llengua sarda de la prestigiosa revista de política internacional *Le Monde Diplomatique*, que actualment s'edita

en 17 llengües, tres de les quals no són estatals: el català, el sard i l'esperanto. L'edició en sard, com l'esperantica, no es distribueix impresa, sinó que es pot consultar lliurement a la xarxa a l'adreça sc.mondediplo.com.

Contra la mundialització unilateral a Xile

Durant el primer Fòrum Social Xilè, desenvolupat en paral·lel i en oposició a la trobada de l'APEC a Santiago de Xile, els esperantistes van manifestar-se sota la seva pròpia pancarta, a la protesta pacífica més multitudinària des del final de la dictadura, contra la visita del president nord-americà George W. Bush i contra les polítiques neoliberals del govern xilè. Durant el Fòrum els esperantistes van organitzar un taller sobre democràcia lingüística i drets lingüístics, com una forma més de mundialització alternativa.

José Antonio Vergara / Nun

Guia de llenguatge visual

Els cent mil soldats, funcionaris i contractistes nord-americans desplegats a l'Irac des de la primavera de l'any passat no saben pas, la majoria, expressar-se en àrab ni en cap de les llengües parlades a l'Orient Mitjà. Però el contacte directe i diari amb la població iraquiana fa que s'hi hagin de comunicar d'alguna manera. Per això disposen d'una "guia plegable

de supervivència en llenguatge visual", publicada per Kwikpoint, amb la qual poden mantenir converses bàsiques i donar ordres a la població local. El manual ajuda el personal civil i militar anglòfon a comunicar-se amb la població civil i amb presoners, detinguts i interrogats arabòfons amb signes gestuals i un apartat d'infografia.

La guia de l'Irac, que també inclou mapes de la zona i algunes paraules en àrab iraquiana, kurd i persa, es pot adquirir per onze dòlars.

Vilaweb

La Palm en esperanto

Cada cop són més les aplicacions que es troben a la xarxa per a PALM OS i que se serveixen de l'esperanto en els seus menús. Ací en comentarem només dues:

LINGO: Programa de traducció mot a mot a molts idiomes, inclosos el català i l'esperanto mateix. El seu mèrit radica en el fet que fa servir l'esperanto com a llengua pont per a la traducció. Es pot descarregar de franc a www.palmcat.org.

SC-102P: Una calculadora científica completa i a tot color. Es pot descarregar en anglès, alemany i esperanto.

Ferran Marín

KAPEGUJA RENKONTIĜO

TROBADA A CAN CAP GROS

4a, 5a kaj 6a de marto 2005 en restadejo Can Soleret de Mataró
4, 5 i 6 de març a l'alberg Can Soleret de Mataró



**esperanto-kursoj, paroladoj, diversaj agoj...
kaj, kompreneble, diboĉado
kursos d'esperanto, xerrades, diversaj aktivats...
i, evidentment, farr**



aliĝilo baldaŭ sendota, plian informon ĉe:
aviat enviarem el full d'inscripció, més informació a: f.macip@esperanto-ct.org

Niaj proverboj (2)

Pedro Martín Burutxaga

Kutime proverboj estas rigardataj kiel la frukto de plurjarcenta praktika sperto pri la naturo, kaj monda kaj homa. Iaspecaj mikro-lecionoj pri la vivo transdonitaj de generacio al generacio (Proverbo estas sperto, proverbo estas averto). Kaj plejmulto el ili estas fakte tiaj.

Sed tiel, kiel klarigi la ekziston de proverboj kun kontraŭaj sencoj, se ja naturaj faktoj restas ĉiam la samaj? Vidu jene kelkajn ekzemplojn:

- Espero kaj pacienco kondukas al potenco ⇔ De atendo kaj espero pereis multaj sur la tero.
- Dio donis tagon, Dio donos manĝon ⇔ Dion fidu, sed senfare ne sidu.
- Akvo kaj pano servas al sano ⇔ De tro da pano venas malsano.
- Unua atesto estas la vesto ⇔ Valoras ne la vesto, valoras la enesto.
- Edziĝo najbara garantias de eraro ⇔ Ŝtelu malproksime, edziĝu proksime.

Respondon al tiu demando ni trovas denove, kvankam ne eksplicite, en la vortoj de Marko Zamenhof en lia antaŭparolo al la *Proverbaro Esperanta* jam menciita: “per mallonga proverbo oni ofte pli bone kaj pli konvinke esprimas ian ideon, ol per multevorta parolado”. Jen la esenco de tiaj proverboj: ili estas simplaj iloj por konvinki aliajn pri nia praveco, subjektivaj argumentoj kamuflitaj kiel universale pruvitaj faktoj. Same kiel en pluraj popolaj kulturoj ekzistas diskutoj per improvizitaj versoj aŭ kantoj, la celo de tiaj proverboj estas provizi argumentojn en diskutado aŭ tute simpla babilado.

Sed nun estas la momento por pliriĉigi la esperantan stokon da proverboj per la kontribuajtoj de niaj legantoj. Bedaŭrinde ne multaj reagis al nia helpo-peto krei esperantajn versiojn de katalunaj proverboj. Tamen ni ja ricevis altkvalitajn kontribuojn kiujn ni elkore dankas. Jen proponitaj proverboj kaj ekvivalentoj esperantaj de vi sugestitaj:

Quan hom està de pega, fins amb els collons ensopega:

- Kiam homon trafas malbonoj, li stumblas eĉ kontraŭ siaj kojonoj.
- Kiam sorto mokas, eĉ kuketo sufokas.
- Kiu peĉon havas, sur kojonoj stumblas.

Trons de cul, tempesta de merda:

- Elpugaj tondroj, tempesto el merdo.
- Pugo bruas, merdo fluas.
- Pugo-tondro - merdo-ŝtormo.

Allà on hi ha pèl hi ha alegria:

- Ĉe vilo evidenta, ĝojo malsilenta.
- Kie haro, tie gajo.
- Kie haroj, tie plezuroj.

Estas nun via vico decidi pri viaj preferataj versioj kaj malavare sed trafe uzi ilin dum kongresoj, renkontiĝoj aŭ en korespondado, same kiel aliajn proverbojn. Memoru pri la vortoj de Marko Zamenhof “Konado de proverboj estas necesa por perfekta konado de la lingvo”, do ilia diskonado estas ankaŭ nepra.

Kaj por plibonigi tiun konadon hodiaŭ mi kunportas plian serion da proverboj kies komunan elementon estas, ke en ĉiuj el ili aperas bestoj. Tamen, kiel kutime, la senco de la proverbo estas multe pli ĝenerala kaj aplikeblas ne nur al bestoj, kiel vi poste vidos.

Fakte, uzo de bestoj en proverboj kaj eldiroj estas tre komuna en multaj lingvoj, sed ĉiu kulturo havas sian propran mondobildon. Por angloparolantoj, ekzemple, la plej malbonodora besto estas la kapro, ne la porko. En esperanto ni havas la konatan esprimon “propeka kapro”, t.e. tiu kiu ricevas nemeritan ekzemplaran punon; kaj ankaŭ la kapro havas econ kiun ni atribuas al alia kvarpieda besto: “obstina kiel kapro” (“tossut com una mula”); sed kurioze, kaproj ankaŭ rolas en pluraj aliaj esperantaj proverboj, kiel en tiuj kiuj asertas “Tro nutrita kapro fariĝas kiel apro” aŭ “Sur arbon kliniĝintan saltas la kaproj”. Fakte,

luj proverboj estas subjektivaj argumentoj kamuflitaj kiel universale pruvitaj faktoj

se ni ne fidus je nia amata Zamenhof, ni eble suspektus pri stranga inklino lia pri kaproj; des pli se ni legas la sekvan proverbon: “Eĉ kaprino plaĉas, se la doto sufiĉas”.

Sed jen, sen pliaj atendoj, la promesitaj pri-bestaj proverboj:

- Al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras. (A cavall regalat no li miris el dentat).

- La luno ne aŭskultas, kiam hundo ĝin insultas. (Brams d’ase no pugen al cel).

- Vi varmigis serpenton, ĝi al vi enpikos la denton. (Crieu corbs i us trauran els ulls).

- Lupo ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn. (El llop muda les dents, però no els pensaments).

- Koko krias fiere, sed ne danĝere. (Gos que lladra no mossega).

- Azenon komunan oni batas plej multe. (L’ase del comú, el pega tothom i no el manté ningú).

- Kiam kato promenas, la musoj festenas. (Quan el gat no hi és, les rates ballen).

- Pri la lupo rakonto, kaj la lupo renkonte. (Qui del llop ha esment, prop se’l sent).

- Korvo al korvo okulon ne pikas. (Un corb no treu l’ull a un altre corb).

- Pli valoras tuj ovo, ol poste bovo. (Val més un ocell a la mà que cent a volar).

Kaj laste mi denove proponas al vi traduki tri pliajn katalunajn proverbojn kiuj pro evidantaj kialoj ne havas oficialajn

esperantajn ekvivalentojn, afero kiun ni devas senhezite korekti. Jen ili:

- Qui alça l’anca perd la banca, qui aixeca el cul perd el bagul. (signifo: kiam oni foriras, li perdas sian sidlok)

- De mig cos en avall no hi ha cap dona lletja. (signifo sufiĉe klara)

- Eren set que l’hi aguantaven i encara pixava tort. (moke uzata kiam multaj homoj faras kune kaj sensukcese tute simplan aferon)

Kiel ĉe la antaŭa propono, sendu viajn sugestojn, ne nepre literalajn tradukojn, al la Redakcio. En venonta numero de la revuo ni diskonigos la sugestitajn versiojn.

PREZENTI ESPERANTON

La eŭra danĝero

Giuseppe Castelli (el L’Esperanto)

Esperanto? Ĝi laŭmodis en la epoko de mia avo! Sed vi neniam sukcesos malaperigi la naciajn lingvojn kaj anstataŭigi ilin per senkultura kaj senhistoria kodo, en kiu neniuj povus verki poemon aŭ diri “mi amas vin”...

Se vi neniam aŭdis tiajn protestojn, vi povas ĉesi legi. Sed verŝajne vi ja aŭdis ilin. Damnaj antaŭjuĝoj! Kiom longe ni devos batali kontraŭ ili?

La plej bona maniero forigi la antaŭjuĝojn estas, ke ni mem ne estigu ilin. Prezenti esperanton ne facilas, kaj tre ofte ni mem, per niaj vortoj kaj nia konduto, donas tute malĝustan impreson; el tiu ĉi fakto, kaj ne el ia konspiro de la dioj, naskiĝas la antaŭjuĝoj.

Ekzemplo: la eŭro. Ofte esperantistoj argumentas: “Eŭropo decidis havigi al si komunan monon, nun necesas ankaŭ komuna lingvo!”. Ni pripensu la efikon de tia komparo.

La eŭro ne ekzistis antaŭ sia enkonduko en Eŭropo: oni kreis ĝin “el nenio” ĝuste por tiu celo. Do, komparante ĝin al esperanto, ni plifortigas la disvastiĝintan opinion, ke esperanto ne estas lingvo jam longe elprovita kaj funkcia, sed nura ideo ankoraŭ eksperimentenda.

Post mallonga periodo da kunekzistado kun la landaj monunuoj, la eŭro tute anstataŭis ilin. Do frazo kiel “Ni enkondukis la eŭron,

ni enkonduku esperanton” sonas kvazaŭ: “Malaperis liroj, markoj, guldenoj; nun malaperu la itala lingvo, la germana, la nederlanda...”.

Ĉu do, pro tiu danĝero de miskompreno, ni tre zorgeme parolu pri eŭro kaj esperanto, atentigante pri la similaĵoj kaj diferencoj inter ili?

Laŭ mi ne, eĉ tio ne indas. Eblas distingi du kazojn:

Vi spertas pri eŭro-nivelaj politika agado kaj lobiado. Ekzemple vi membras en partio aŭ en internacia organizo, kaj dum via vivo vi multe rilatis al politikistoj kaj lernis kapti ilian atenton. Do vi certe povas rakonti pri esperanto al eŭropaj gravuloj (se vi ial taksas tion

farinda), kaj ne necesas ligi ĝin al tute senrilataj aferoj kiel ekzemple la eŭro.

Vi estas ordinarulo kiel mi: dum via vivo vi neniam renkontis gravan politikiston, neniam trejniĝis pri publika parolado, neniam publikigis artikolon en *Le monde diplomatique*, kaj pri esperanto vi povas paroli nur kun la frizisto aŭ kun viaj amikoj el la trinkejo. Ĉu vi certas, ke ili ĝuus vian prelegon pri “Komuna mono kaj komuna lingvo? Anstataŭ tiel teoriumi, rakontu al ili pri via vojaĝo tra Pollando aŭ pri viaj japanaj gastoj! Ni havas ion tre specialan kaj interesan por prezenti; la diskutojn pri monunuoj kaj lingvopolitiko ni povas lasi al la spertuloj.

Interreta rubriko

De la retpaĝaro de KEA oni povas atingi la paĝon de la Esperanto-Departemento de Amikoj de Unesko en Barcelono:

www.esperanto-ct.org/esperantoBCN

Niaj plej junaj legantoj surpriziĝos eksciante, ke meze de la pasinta jarcento la usona armeo uzis esperanton.

Temis pri trejnado de speciala militista grupo, kiu devis roli kiel “la malamiko” en la epoko de la “malvarma milito”. Por igi la manovrojn pli realismaj, oni decidis uzi alian lingvon ol la angla, kaj por ofendi neniun landon oni elektis esperanton. Vi povas trovi la oficialan frazlibron de la usona armeo “Esperanto: The Aggressor Language” en:

www.thesmokinggun.com/archive/esperanto1.html

Interesplena paĝo pri proverboj en esperanto kaj aliaj lingvoj (informis Hèctor Alòs):

members.tripod.com.ar/kocher/index.htm

Loknomoj, nomoj de ŝtatoj, kontinentoj, mondaj organizaĵoj, maroj ktp, skribitaj multlingve, ankaŭ en esperanto (informis Gerard Escuer):

www.geonames.de/index.html

Lingva angulo

Nerektaj demandoj en esperanto

En esperanto nerekta demando ne estas demando kia *ĉu vi estus tiel afabla sciigi min pri la poentado de la futbalmatĉo okazinta hieraŭ inter la bervalaj kaj loka teamoj?*

Serioze; mi parolos pri frazoj kiaj *li demandis min, ĉu li povos veni* — ni nomu tiujn “tipo I”. Ekzistas aliaj tipoj de similaj propozicioj — ekzemple, *mi ne scias, kiam li venos* — sed mi parolos pri la unua tipo. En tiaj propozicioj ĉiam oni uzas la ligan vorton *ĉu*, tiu afero estas klara. Neniam oni uzas *se*. *Se* estas subjunkcio tipe uzata en kondicionalaj frazoj kiaj *se mi povas lin kisi, vi ankaŭ tion povas* — ni nomu tiujn “tipo II”.

Mi diras tion, ĉar sufiĉe ofte denaskaj latinidoj misuzas *se* anstataŭ *ĉu* por la tipo I; ne nur komencantoj buŝe esprimante sin sed, foje, ankaŭ spertuloj paŝantaj sur la skriba tereno. Mi tuj donos frazon realan prenitan de interreta listo:

“En sia biografio, Shatner diras ke pro la filmo li sukcesis la rolon de Kapitano Kirk en “Star Trek”, sed mi ne plu memoras *se* li mencias esperanto-n.”

En la latinidaj lingvoj estas io respondebla pri la mispaŝoj (en esperanto). Unue ni precizigu la karakteron de la frazoj tipo I:

- a) aŭ eblas respondi nur jes aŭ ne; provu kun *mi ne scias, ĉu tio estas vera*;
- b) aŭ la demando permesas nur du respondoj apartaj inter si, kiel ĉe *mi ne distingas ĉu tio estas viola aŭ nigra*.

En latino oni uzas la ligan vorton *si* kaj por la frazoj tipo I kaj por la tipo II:

- A) *ibo, visam si domist* (mi iros kontroli ĉu estas en la domo);
- B) *quod erat bellum, si hostis Antonius non erat?* (kia milito okazadis, se Antonio ne estis la malamiko?).

La latinidaj lingvoj heredis tiun uzon ĝis tia grado, ke *si* estas la

sola ligilo ebla por la frazoj tipo I kaj la plej ofte uzata por la aliaj. Mi finas per kelkaj ekzemploj **bonaj** en la latinidaj lingvoj, sed kiuj misgvidas en esperanto:

- vous verrez bien si je fais mal (vi juĝos ĉu mi agas malbone);
- ignoro si es soltero o casado (mi ne

scias ĉu li estas fraŭlo aŭ edzo);
- vedi se è possibile fare così (kontrolu ĉu eblas tiel agi);
- pregunta-li si ho sap (demandu al li/ŝi ĉu li/ŝi tion scias).

Fina noto: la ekzemploj estas prenitaj el diversaj vortaroj.

Memoru: en esperanto oni ĉiam uzas nur *ĉu* por por la frazoj tipo I.

Ramon Perera

Lagado

Gullivero, dum unu el siaj vojaĝoj, vizitis Balnibarbi-insulon, kies ĉefurbo estas Lagado. Elstara insulano montris al li la Akademion, kie troviĝas plej interesaj aparatoj: unu el ili konsistas el multaj kubo, sur kies facoj estas skribitaj literoj. La klera akompananto klarigis al Gullivero ĝian celon: pere de tiu ĉi mirinda ilo oni povas verki pri ĉiuj eblaj temoj !!??

LAGADO estas cerbumiga literpada ludo. Sube, jen vorto-plena kaĉo en toroida (*) kaldrono deksex-ĉela. Pro tio, vi jam konstatis, ke kolonoj dekstra kaj maldekstra kuntuŝiĝas kaj same la linioj supra kaj malsupra. Konsekvence, ĉelo 11 kuntuŝiĝas al 44, 14 al 41, 41 al 14 kaj 44 al 11.

En ĝi vi eltrovu plej multajn minimume kvin-literajn Nov-PIVajn kapvortojn. Por tion fari, oni iru de ĉelo en ĉelon laŭ ir-movo de reĝo ŝaka. Tamen, oni ne rajtas eniri plurfoje saman ĉelon en sama kapvorto.

Notu bone, ke en la supra kaldrono troviĝas cent kvardek du validaj kapvortoj: 84 kvin-literaj, 38 ses-literaj, 13 sep-literaj, 2 ok-literaj, 3 naŭ-literaj, 1 dek-litera kaj... 1 dek ses-litera, kiu valoras 65536 poentojn!!!

(*) Toroido: objekto simila al toro.

UNUA KALDRONO

Laŭbezone

G+ estas G aŭ Ĝ / S+ estas S aŭ Ŝ

14	24	34	44
A	R	R	K
13	23	33	43
T	A	R	T
12	22	32	42
I	I	S+	O
11	21	31	41
F	G+	O	N

Ekzemploj: SATIR (32-23-13-22-33); SIFON (32-22-11-42-41); FAKTOR (11-14-44-43-42-33); ATROFI (14-43-33-42-11-12) kaj ARTIŜOK (23-24-13-22-32-31-44).

LAGADO-KONKURSO n-ro 1

Konkursanto sendu sep plej valorajn (nepre minimume kvin-literajn) Nov-PIVajn kapvortojn eltrovitajn en la kaldrono. Por ĉiu ĝusta solvo oni ricevas poentojn laŭ la longeco de kapvorto – t.e. laŭ la N-a potenco de du, kie N estas la nombro de literoj de kapvorto. Ĉi tiuj poentoj estas enskribitaj en liston, kaj ies poentonombro kreskas, se oni daŭre konkuras. Post ĉiu Konkurso, kiu havas plej altan poentaron, tiu ricevas premion (okaze de egaleco, decidus la alfabeto ordo de familia nomo de konkursantoj) kaj ĝiaj poentoj estas nuligataj. Se premiito denove konkuras, tiam ĝi komencas kun nul poento. Ĉi tiu sistemo ja garantias, ke konkursanto iam gajnos premion, ĉar rekompenco ne dependas de lotumado. Sendu viajn eltrovaĵojn antaŭ la 15a de februaro al la ret-adreso joaramgui@hotmail.com aŭ al Joan-Ramon Guiñón i Roset, carrer de Vilamarí 106-108, 08015 Barcelona.

Familia etoso

Joan Inglada


Kritiki serioze teatraĵon kaj ĝuste ĝian surscenigon ne estas facila tasko, se krome temas pri komedio. Tamen *Familia etoso* ne temas ekzakte pri komedio, sed pri tragikomedio. En ĝi denove aperas la neniam finiĝanta historio pri komunikada malfacileco ĉe la paroj. Ĉi-okaze la afero situas ĉe du fratoj iliaj edzinoj. La kafejestro Henriko (*Arno Lagrange*), la senutila simplanimulo de la familio, fronte al la subdirektoro Filipino (*Bernard Martinez*), la stulta arogantulo, kiun admiregas la superreganta kaj manipulanta masklisma panjo (*Christine Vidotto*). La tuto estas kiel duopa kontraŭpezilo, aŭ prefere, kiel porinfana karuselo. Ankaŭ po du estas la oficistino Benjo (*Catherine Martinez*), la ribelanta filino, kaj Deniso (*Gérald Tibi*), la kelnero. Alia karusela paro estas la du bofilinoj – Arleto (*senrolo*), la parulino de la ŝtipkapa frato, kiun ŝi forlasas, kaj la alia, Jolando (*Catherine Planche*), subpremata de la teroro de la posedema kaj superreganta edzo. Sur ŝin falas unu el la tiklaj tragikomiaj roloj de la verko: oni ridas por ne plori antaŭ tiu idiotino por supervivado. Kaj ankaŭ po du estas la hundoj. Ĉiu rolulo – kun sia aparta tragedio

en ties mediokra vivo. La karuselo turnas ĉirkaŭ la patrino, ne ĝuste kiel ĉefmasto, sed kiel rusta kaj dekadenca akso de malnova karuselo produktanta ĉi tian viglan kaj malstabilan ekvilibron, sur kiu balanciĝas la argumento.

La malfacileco de la surscenigo kuŝas ankaŭ en la aktora elekto ĉe la kazo de la profesia teatro. Niaokaze temas pri amatora teatro. Do ni ĉiuj jam scias, pri kio temas. Tamen mi deziras rimarki, ke en mia lando, en Katalunio, la amatora teatro estas la bakforno, de kie eliris la plimulto de aktoroj kiujn hodiaŭ ni konas. Mi ne scias, ĉu tiel okazas alilande. Por ne iri pli malproksimen, en mia urbo, Vilanova i la Geltrú, tiu fama Sergi López komencis aktori en teatro de amatoroj – kaj mi mencias lin, ĉar li estas tre konata kaj premiita ankaŭ en la Franca Respubliko.

De ĉi tiuj bazoj mi konjektas la malfacilaĵojn, kiujn, supozeble, la reĝisorado devis alfronti. Diverseco de aktoraj kapabloj, fizikaj kaj ankaŭ de movado sur la scenejo, eĉ voĉaj aŭ elprononcaj. Projekciado de la voĉo, parkerigado de la teksto kaj voĉa intenseco

En “Familia etoso” denove aperas la neniam finiĝanta historio pri komunikada malfacileco ĉe la paroj



taŭga por ĉiu momento, inter aliaj, estas la ĉefaj problemoj. En la profesia teatro la aktoroj dediĉas pli da horoj al la fizika kaj psiĥa preparoj ol al la ludado. Disponibleco de tempo por la provludo, eksteraj malhelpoj, kiuj tuŝas rekte la provludon, kaj krome la regadon de la lingvo, en la esperanta medio, estas aliaj koncernaj demandoj. La teatro-grupoj devas konsideri ankaŭ la tempodaŭron, ĉi-okaze tro longa, laŭ mia opinio. En Esperantio oni devus zorgi pri tio, precipe la organizantoj, kiuj devus esti informitaj ankaŭ pri la karaktero kaj aliaj aspektoj de la verko kaj de la ensemblo kaj programi ĉi tiujn aranĝojn en alia horo ne tiel mistempa.

Tion ĉi dirinte, ni jam havas multajn bazajn ingrediencojn por ekkui.

La grupo estas ambicia kaj havas kapablon enblovi freŝan nuntempan artan influon en la esperanto-kulturon.

Temas pri premiero kaj ni ĉiuj scias, kion tio signifas. Oni ne povas diri, ke precize iu aktorino malbone sed la teatraĵo ne sufiĉe bone funkciis. Arno konas, proprasparte, la malfacilaĵojn sin reĝisoro, eble tial li nun aperas nur kiel sursceniganto, sed mi konjektas influon sur la reĝisoro. Verŝajne, de la scenejo mem li ne povus percepti la malsamajn voĉintencojn, ĉar, efektive, la sonteknikisto Floreal Martorell rimarkis, ke iuj aktoroj parolis mallaŭte kaj li altigis la voĉintenson, tiam Henrikon oni aŭdis tro laŭte. En Jolando kuŝas unu el la elstaraj partoj de la tragikomedio kialo. Tial ŝia rolo devas esti prilaborita pli multe.

Miaopinie ĉi tiu verko, reprezentita de amatoroj kaj en esperanto, postulas direktoron kaj reĝisoron, ambaŭ ekster la scenejo. La reĝisoro havas multe da detala laboro pri ĉiu rolo. La direktoro devas kunigi ĉion, kion la reĝisoro faras. En Katalunio kutime ekzistas direktoro kaj direktora helpanto. En Anglujo mi konstatis direktoron kaj surscenejan movhelpanton. Arno, kiu ankaŭ havas surscenigajn respondecojn, ne povas scii, kio okazas de la flanko de la spektanto, ĉar li staras sur la scenejo. Antaŭ kelkaj jaroj en Katalunio, Lluís Homar, en hamleta rolo kaj sinreĝisorante, luis aktoron por esti anstataŭigita dum li reĝisoris en la provludoj, kaj malgraŭ tio la rezulto ne sufiĉe sukcesis. Flavie Audibert ŝajnas havi klarajn ideojn kaj la kapablon reĝisoro. Ili pripensu tion. Ili ambaŭ devas trovi la solvon kaj mi estas certa, ke ili povas tion fari. Mi nur konjektas.


La premiero jam okazis. Se profesiuloj sufiĉe suferas, oni imagu pri amatoroj kaj krome en esperanto. Ĉi tiu verko estis sufiĉe premiita kaj bone sukcesis kaj en la Franca Respubliko kaj en la Hispana Reĝlando. Ĝi havas bonan teatran strukturon kaj tiajn rolojn moviĝantajn en la dolĉ-acida punkto inter verŝajno kaj realo. Ĝi pritraktas la memestimon kaj la indajn aŭ malindajn ĉiutagajn temojn de la homa konduto kaj la seksa subpremo ligita al perforto. La tragikomediaj elturniĝoj, kiuj ridigas la spektantojn, ne estas sufiĉe nuancitaj, sekve ili ne ricevas la komplacecon de la spektantoj. Tiuj elturniĝoj estas nepra afero en ĉi tiuj verkoj, por ebligi la eskapon de la tragika realo.

Ĉi-okaze la Teatro-Trupo de Tuluzo havas kiel atuton, ke la aŭtoro-tradukisto de la teksto estas membro de la grupo. Li estas Rikardo Cash, kiu skribis imponegan, luman kaj tre kompreneblan tekston tre ĝuste trovinte la lingvon de la kernaj trajtoj por la bona kompreno kaj efiko de la grimacoj de la verko. Ni gratulas lin. Kiel li mem diras, temas pri ambicia propono, sed la grupo estas ambicia kaj havas kapablon ludi ĝin bonege kaj kulmini la celon de Arno: enblovi freŝan nuntempan artan influon en la esperanto-kulturon. La geaktoroj kapablas; estas afero nur de nuancoj, sed nemalhaveblaj. Mi voĉdonas por la Teatro-Trupo de Tuluzo kaj deziras al ili, dum multaj jaroj, kuraĝon kaj multan merdon!*

Joan Inglada

*Kiam oni iris al la teatro per ĉeval-aŭtoj, se ne estis multa merdo en la strato, tio signifis ke la teatro estis malplena kaj tial malsukceso de la teatraĵo.

Jubilea Libro



Ĉefa programero de la kongreso estis la prezento de la ĵus bakita libro de la historiisto Francesc Poblet i Feijoo, kaj kvazaŭ antaŭfrando al lia preparata doktora tezo. Temas pri du-lingva verko: ĝi komenciĝas per la originala teksto en la kataluna (40 paĝoj), sekvas grafikaj dokumentoj (24 paĝoj) kaj la libro finiĝas per la traduko al esperanto de la teksto. Ĝin prezentas en antaŭparolo la nord-kataluna historiisto de la esperanto-movado Jean Amoureux.

Krom mallonga enkonduko kaj analizado de la precidentoj, la verko analizas nur la 12 unuaj jaroj de esperanto-aktivo en Katalunio, kun oftaj referencoj al la aliaj Katalunaj Landoj. Precize, la periodo iras de 1896, dato de la unua letero en esperanto malkovrita ĉe ni, ĝis 1908, la jaro antaŭ la Universala Kongreso en Barcelono, kies mejloŝtona graveco por nia movado meritas same ampleksan libreton.

Kvankam la teksto listigas dekojn kaj dekojn da aktivuloj, societoj kaj urboj, ĝis nivelo foje iom kapturiga, la analizado de la informoj, kiujn faras la aŭtoro, estas atentokapta: la sekso, profesio, deveno de la aktivuloj estas studataj, kaj tiel eblas klarigi faktojn, kiuj nun montriĝas iom ŝokaj por ni, kiel

la multeco de armeaj oficiroj inter la pioniraj esperantistoj. La broŝuro ankaŭ bone atentigas kaj klarigas la rapidan ŝanĝon de la grupa etoso, post kiam pastroj kaj militistoj estis anstataŭitaj en la gvidaj roloj far katalunistoj kaj maldekstruloj.

Entute temas pri facile legebla verko, tre bele eldonita kaj interesege ne nur por esperantistoj, sed por ĉiuj homoj scivolemaj pri la socialaj movadoj en la komenco de la 20a jarcento. Tial ĝia eldono en la kataluna estas plene pravigita kaj gratulinda, same kiel la distribuo de 60-70 ekzempleroj al diversaj bibliotekoj de la tuta lando.

Pep Pou

Francesc Poblet i Feijoo: *Els inicis del moviment esperantista a Catalunya – La komenca esperanto-movado en Katalunio*. Kataluna Esperanto-Asocio & O Limaco Edicions, Constantí, 2004. ISBN 84-933380-5-2. 120 paĝoj kun fotoj.

Un libro imprescindibile



Feia más de deŭo anys que el manuskript d'aquest libro circulava de mà en mà. Les dades que conté són imprescindibles

per a qualsevol que s'interesi per l'esperanto, especialment els qui aprenen la llengua, però també des dels simples curiosos sobre el tema fins als bons coneixedors de tot allò relacionat amb la llengua internacional. No en va, com l'aŭtor diu a la nota preliminar, és "el libro que jo mateix hauria volgut llegir quan vaig començar a aprendre esperanto", però l'obra va molt més enllà i desborda erudicio per totes bandes.

Anem a pams. L'obra es divideix en sis parts, d'extensió molt desigual, a més a més d'uns apèndixs finals: generalitats, llengua, literatura, cultura, història i bibliografia selecta.

En el primer capítol l'aŭtor respon a les preguntes més típiques sobre l'esperanto, sense defugir-ne cap, com, per exemple, quants parlants té.

El capítol sobre la llengua és una presentació lingüística magnífica. Tant de bo les seves anàlisis sobre la vitalitat i l'evolució de la llengua trenquessin tants prejudicis sobre l'esperanto!

El capítol sobre literatura és també excel·lent i només el podia escriure una persona amb un coneixement tan aprofundit sobre la literatura en esperanto, Valén és un crític prestigiós, aŭtor premiat i possiblement el millor corrector d'estil en esperanto.

La presentació de l'esperanto com a vehicle portador d'una cultura en part pròpia, és moderna i el resum històric és correcte, tot i que probablement massa sintètic.

De fet, l'únic petit defecte del libro és la seva descompensació: el capítol final, la bibliografia selecta comentada, ocupa una tercera part de l'obra. Realment es tracta d'un treball únic fins ara: el fil d'Ariadna a tota la producció bibliogràfica en esperanto, tant la literària

– original i traduïda –, com les gramàtiques, els diccionaris, els cursos, les lectures per a principiants, etc. Un treball excepcional. Posats a buscar però, potser caldria afegir algun apartat de bones lectures lleugeres, on poguéssim trobar-hi les novel·letes detectivesques de Sten Johansson que, certament, no mereixen figurar entre les grans obres de la literatura en esperanto, però potser són més llegidores per a molts que la majoria de les obres que es presenten. També un apartat semblant sobre música, un fenomen que ha evolucionat vertiginosament en els últims 15 anys, faria el libro un xic més planer.

Finalment cal destacar les virtuts didàctiques de l'obra: cada capítol té un resum final, emmarcat, que serveix per a una lectura ràpida, però alhora ajuda als estudiants a memoritzar els continguts bàsics.

L'única cosa que cal lamentar és que aquest libro hagi trigat tant a publicar-se i que, finalment, hagi estat fet en una petita editorial esperantista sense pràcticament cap distribució en llibreries. Això posa en evidència la poca empenta del moviment esperantista espanyol. Però si us ha arribat notícia de l'obra, us interessa el tema i sabeu on hi ha un grup esperantista prop vostre, no dubteu ni un instant d'anar a buscar el libro. És una joia.

Hèctor Alòs i Font

Antonio Valén: *El esperanto: lengua y cultura*. mga, Santander, 2004. ISBN 84-920931-4-5. 192 pàg.

Abonu viajn revuojn!

KEA peras konsiderindan nombron da esperanto-revuoj, kredeble la plej interesajn. Ni listigas ilin laŭteme. Se vi ne trovas vian ŝatatan, ne hezitu peti ĝin al ni.

Movadaj

La revuo Esperanto estas la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi enhavas artikolojn pri la movado en diversaj landoj, pri kongresoj kaj pri movada strategio. Ĝi informas ankaŭ pri novaj libroj en esperanto, ofte kun recenzo. 11 x 24 paĝoj, preskaŭ A4. 35 eŭroj. (KEA peras ankaŭ la membrotizojn de UEA: membro-abonanto kun Jarlibro, 55 eŭroj; junuloj ĝis inkl. 29 jaroj, kun Kontakto kaj Tejo Tutmonde: 22 eŭroj)

La Ondo de Esperanto estas bone redaktata internacia forumo de raportoj kaj opinioj el diversaj tendaroj de la esperantismo. Ĝi enhavas ankaŭ literaturajn kaj kulturajn paĝojn kaj elstaran skipon de regulaj kunlaborantoj. Ĝus aperis nova rubriko pri diversaj landoj, kies unua ero, Nord-Osetio, starigis altegan nivelon. Rusio, 12 x 20 p. A4. 27 eŭroj.

Heroldo de Esperanto estis transprenita en 1997 de Kooperativo de Literatura Foiro, kaj de tiam fariĝis la podio de ĝia tre aparta formo koncepti esperantismon. 16 x 4 p. A3. 32 eŭroj.

Pedagogiaj

Kontakto estas la socikultura magazino eldonata de TEJO kaj vigle redakta de Ĵenja Zvereva. Ĝi ne enhavas artikolojn pri la esperanto-movado, sed pri la mondo kaj vivo, kvankam ne pri aktuala politiko. Precipe por junuloj kaj lernantoj. Kelkaj artikoloj en facila esperanto, kun uzo de nur la 520 aŭ 1000 plej oftaj vortoj de la lingvo. 6 x 16 p. A4. 15 eŭroj (kolektiva abono per KEA).

Komencanto estas revuo por ĉiu, kiu lernas, posedas aŭ

instruas esperanton. Speciale taŭgas por kursoj, grupoj, societoj. Enigmoj kaj konkursoj, kaj ankaŭ artikoloj el diversaj landoj pri la lingvo, la literaturo, la movado kaj ties historio. 6 x 16 p. A4. 15 eŭroj.

Juna Amiko. Por lernejoj kaj aliaj lernantoj (kaj ties gvidantoj). Rakontoj, ludoj, ekzercoj kaj artikoloj pri la historio de la esperanto-movado. 4 x 28 p. A5. 14 eŭroj.

Internacia Pedagogia Revuo estas la revuo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj enhavas raportojn kaj artikolojn pri la instruado de esperanto. 4 x 40 p. A5. 18 eŭroj.

Aliaj

Monato estas magazino sendependa, kun raportoj, artikoloj kaj debatoj pri politiko, ekonomio, kulturo, turismo kaj ĉiaj aferoj de la moderna vivo. Unika revuo en esperanto kaj tre rekomendinda. 12 x 32 p. A4. 39 eŭroj.

La Jaro estas poŝkalendaro de Monato. ĉ. 80 paĝoj, A6. 5 eŭroj.

La Kancerkliniko sin taksas "ajnista" kaj "skandalema". Ĝi entenas riĉan kaj tre varian enhavon de noveloj, poemoj, bildstrioj. Ĝi estas socie kaj politike engaĝita kaj ankaŭ prikomentas novaĵojn de la esperanto-mondeto. Abono por kvar sinsekvaj numeroj + kromnumero (plej ofte literatura). 4 x 24 p. A4. 20 eŭroj.

Etnismo estas la organo de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj. Ĝi enhavas detalajn artikolojn pri minoritatigitaj popoloj tra la mondo. 2-3 numeroj, sume 36 p. A4. 10 eŭroj.



La movado **havis** SEMAJNON
... ĝi kostis 208 eŭrojn
... ĝi aperis unu semajnon

La movado **havas** MONATON
... ĝi kostas nur 44 eŭrojn*
... ĝi aperadas jam 25 jarojn

La movado **havos** MONATON
... dum la movado abonas ĝin
... MONATO bezonas pli da movado

VI ESTAS LA MOVADO
... Vi bezonas MONATON
... MONATO bezonas Vin

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, moderna vivo, scienco, kulturo kaj multe pli.

Petu provnumeron de MONATO,
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio,
aŭ prefere de monato@fel.esperanto.be

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

*En difinitaj landoj la prezo povas esti alia. Petu informojn de monato@fel.esperanto.be

Scienca Revuo estas la organo de la Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj enhavas fakajn artikolojn pri plej diversaj sciencoj. 4 x 30-40 p. A5. 20 eŭroj.

La Gazeto estas kultura revuo, ĉefe, sed ne nur, pri la esperanta. Ĝi precipe okupiĝas pri historio kaj literaturo, kaj aparte atentis pri recenzoj. 6 x 32 p. Pli-ol-A5. 27 eŭroj.

Fonto estas beletra revuo aperiganta tradukajn kaj origi-

nalajn poeziojn kaj prozaĵojn, sed tre malmultajn recenzojn. 12 x 36 p. A5. 34 eŭroj (por 2004; por 2005 ankoraŭ ne publikigita).

Literatura Foiro estas la organo de Kooperativo de Literatura Foiro. Ĝi estas principe kultura revuo kun tre interesa enhavo, grandparte literatura sed ne nur. Kiel organo de LF-Koop, ĝi enhavas ankaŭ multajn artikolojn laŭ ties vidpunkto. 6 x 56 p. A5. 30 eŭroj.